

Heinrich Heine,

Lorelejo

*tradukita de Joachim Gießner*

Heinrich Heine,

Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

Heinrich Heine,

The Lorelei

*tradukita de Mark Twain*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

*An ancient legend of the Rhine*

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhe-  
lo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenza melodi'.

Ŝipiston en eta boato  
Turmentas koremoci'.  
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,  
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo  
la ondoj lin kun boat'.  
Nun kuŝas li en la profundo  
pro Loreleja kantad'.

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trank-  
vil',  
La supro de l' monto lu-  
miĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuſas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronus finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

I cannot divine what it meaneth,  
This haunting nameless pain:  
A tale of the bygone ages  
Keeps brooding through my brain:

The faint air cools in the gloaming,  
And peaceful flows the Rhine,  
The thirsty summits are drinking  
The sunset's flooding wine;

The loveliest maiden is sitting  
High-throned in yon blue air,  
Her golden jewels are shining,  
She combs her golden hair;

She combs with comb that is gol-  
den,  
And sings a weird refrain  
That steeps in a deadly enchant-  
ment  
The listener's ravished brain:

The doomed in his drifting shallop,  
Is tranced with the sad sweet tone,  
He sees not the yawning breakers,  
He sees but the maid alone:

The pitiless billwos engulf him!-  
So perish sailor and bark;  
And this, with her baleful singing,  
Is the Lorelei's gruesome work.

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)*

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: *Josef.Schiffer@t-online.de* ), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferrojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

*Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)*

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*